




# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO

AÑO XIX - Nº 248

NOVIEMBRE-DICIEMBRE 1981

## 23-a Kataluna Esperantista Renkontiĝo



21-AJ INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

S-ro Mora i Arana legas la verdikton de la 21-aj Internaciaj Floraj Ludoj

**BOLETIN  
DE LA  
FEDERACION ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO**

**DIRECTORA**

D<sup>ra</sup> M<sup>a</sup> Aurora Vitoria Nieto

**DIRECCION**

**Y ADMINISTRACION:**  
Dos de Mayo, 4  
VALLADOLID

**REDACTOR JEFE:**

D. Salvador Aragay Galbany  
Bassegoda, 40 - Telf. (93) 3338081  
BARCELONA-28

**COMITE DE REDACCION:**

- D. Giordano Moyá
- D. V. Hernández Llusera
- D. Gabriel Mora y Arana
- D. Pedro Nuez
- D. Luis Serrano Pérez
- D. Miguel Gutiérrez Aduriz

*La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinionon de H. E. F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinionon de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.*

## UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO  
Dos de Mayo, 4  
VALLADOLID-4

**Prezidantino**

M<sup>ra</sup> Rafaela Uruña Alvarez  
Avda. Ramón y Cajal, 12 2<sup>o</sup>-C  
Télf. (983) 260086  
VALLADOLID-11

**Sekretario**

Luis Hernández Garcia  
adreso kiel supre

**Kasistino**

Carmen Conde Labajo  
Calixto Valverde 8-8<sup>o</sup>-A  
VALLADOLID-14

Pagoj sendu al nia Konto  
N<sup>o</sup> 001.664-0  
Caja de Ahorros Popular  
Ag. Urbana E.  
A. Lorenzo Hurtado, 1  
VALLADOLID

**LIBRO-SERVO DE H. E. F.**

Jacinto Uruña Antón  
Dos de Mayo, 4  
VALLADOLID-4

Pagoj por Libro-servo, sendu al  
Caja de Ahorros Popular  
Oficina Central  
Cuenta N<sup>o</sup> 042.268-4 a nombre de  
LIBRO-SERVO DE H. E. F.  
VALLADOLID

**ELDONA FAKO**

Inés Gastón  
P<sup>o</sup> de la Constitución, 35-4<sup>o</sup>  
ZARAGOZA-1

**INFORMA FAKO**

Ramón Molera  
Sta. Joaquina, 13  
MOYA (Barcelona)

**ĈEFDELEGITO DE UEA**

Juan Azcuenaaga Vienna  
Capitan Palacios, 3 4<sup>o</sup> N  
SANTANDER

**H. E. J. S.**

(Junulara Sekcio de H. E. F.)  
Carretera Cardener, 34 3<sup>o</sup>  
BARCELONA 28

# 23-a KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

26a-27a septembro, 1981 M O I A

Ĉijare la Kataluna Esperantista Renkontiĝo okazis en Moia, la rava urbeto situanta sur altebenaĵo inter Manresa kaj Vic.

La programon oni okazigis en la moderna Aŭditorio de la Kulturdomo «La Caixa» kaj komenciĝis sabate per la inaŭguro de du ekspozicioj, unu pri infandeseĝnaĵoj de la tuta mondo, kiun kolektis S-ro Ramón Molera pere de Esperanto kaj la alia pri la uzado de Esperanto por diskonigi eksterlande la katalunajn lingvon kaj kulturon.

Post la inaŭguro Petro Nuez gvidis lecionon de Esperanto per rekta metodo, kiun ĉeestis pli ol cent interesatoj.

Dimanĉe matene unue estis celebrata katolika diservo en Esperanto fare de Pastro Manuel Casanoves C. M. T. En sia prediko Pastro Casanoves temis pri la fanatikeco: «Pro fanatikeco ni kredas, ke ni ĉiam pravas kaj ke la aliaj neniam pravas, ke ni estas la bonaj kaj la aliaj la malbonaj. Fakte neniu homo estas tute bona, neniu homo estas tute malbona, kaj tio ankaŭ okazas rilate la politikajn partiojn. Vere ni ne scias, kiu estas bona kaj kiu malbona. Justiĝu mem!

Rilate Esperanton: «Ĉu estas favora al ĝi, kiu promesas kaj ne lernas? Lernu kaj disvastigu Esperanton; ne estas la vortoj, sed la faroj, kio

23a kataluna  
esperantista  
renkontiĝo

moia 26-27 septembro 1981



gravas. Katolikoj sin liberigu de mondaĵoj, estu en vero kaj amo».

Pastro Casanoves fine preĝis por la samideanoj, kiuj forpasis inter la du Renkontiĝoj, inter ili, Sebastiano Chaler.

Poste en la Aŭditorio estis ludata en Esperanto per la trupo «La Krizalido» internacia teatro de Akvitanio (Francujo) la teatraĵo «Aminda Kretenino» de Francois Boyer en esperanta traduko de Georgo Lagrange. La ĉefrolantoj, du geaktoroj, verve aktoris. (Li en «Stoki», reprezentante la ordon: La policano, la juĝisto, la pastro; kaj ŝi Maria, la fantazon. En la unua akto la fantazio verŝajne venkis, sed en la dua akto la naiva fantazio submetiĝis sub la realo, kio bedaŭrinde kutime okazas. Jen la tragedio).

Finita la teatra ludado la esperantistoj vizitis la urbodomon, kie estis akceptitaj de la urbestro s-ro Sebastia Ubasart.

Post kelkaj salutvortoj de R. Molera, nome de la esperantistoj, Parolis Pastro. Casanoves. Li diris, ke la

**kataluna esperantista renkontiĝo** sentas sin bone akceptata en tiu historia urbo Moiá kaj de ties demokratia urbeŝtaro. Kiel simbolon de Esperanto li donacis «Katalunan Antologion». Ĝi estas tute en Esperanto, krom sola kataluna paĝo, kiu tekstas: Tiu ĉi «Kataluna Antologio» en la helpa internacia lingvo Esperanto kreita de D-ro Zamenhof estis eldonita por kontribui al la diskonigo tra la tuta mondo de la literatura trezoro de la miljara lingvo de la katalunoj, vivanta formiĝo de nia animo».

Tio ankoraŭ estas aktuala. Esperanto estas kuniga laĉo. Ĉiu devas kulturi la propran lingvon, alfronte al la trudo de imperialismaj lingvoj, kaj la fratigan lingvon Esperanto.

S-ro Sebastiá Ubasart, la urbestro de Moiá, katalunlingve prononcis: «Moiá estas admiranto de Zamenhof. La esperantistoj estas personoj de paco, de kulturo. Devas estiĝi esperantista radiko en ĉiu urbo, en ĉiu nacio, ne cedu. En Moiá Esperanto estas enradikita. Ĝi estas pli da paco, pli da kompreno. Moiá estas kun vi».

Sekve de la tradukado al Esperanto de s-ro Molera, Pastro Casanoves nome de Kataluna Esperanto-Asocio subskribis la Honoran Libron.

Reen al la Aŭditorio por soleni la 21-an Internaciajn Florajn Ludojn. Ĉe la labortablo Pastro Manuel Casanoves kiel Prezidanto kaj Gabriel Mora i Arana kiel Sekretario kaj de la Juĝa Komisiono. Ĉe la honora tablo la urbestro de Moiá, la Prezidantino de HEF Rafaela Urueña Alvarez, la ĉefredaktoro de «Heroldo» Ada Fighiera-Sikorska, kaj aliaj gravuloj.

Gabriel Mora i Arana, antaŭ ol sciigi la verdikton, disertaciis pri la okazaĵo. Li menciis, ke hodiaŭ okazas kvarfoje tiu trobatora solenaĵo post ol kvardek jaroj de kiam galopis la apokalipsaj ĉevaloj, tiel same en la hispana milito kiel en la tutmonda.

**Ĉijare respondis al la florlda alvoko** okdek kvar konkursaĵoj. Tiu nombro supozas novan stadion de firmiĝo en la esperantista poezio. Ĝia ora epoko disvolviĝis antaŭ ol la unua mondmilito. La tiamaĵ esperantistaj poetoj kapablis alte teni la torĉon de nia klasika poezio; sed ili ne havis posteuloj. Ĉu baldaŭ la movado fieros pri alia generacio de poetoj?

La esperantaj florldoj estas inspiritaj en la kataluna tradicio. Kelkaj konsideras ilin arkaj kaj pro la soleno kaj la reĝino. Al tiuj oni povas doni lecionon pri demokratio. En Francujo faŭlino reprezentas la respublikon. En 1927 Delfi Dalmau diris, ke pro amo kaj por amo estas virinoj: Minerva, Afrodita. La poetreĝino estas en nia festo la beleco reĝino. La tradicia progreso estas la avangardo en la progresoj socia kaj sociala». Sekve Mora i Arana memoris niajn mortintojn: Sebastiá Chaler, Lluís Guitart kaj Manuel de Elezcano, kaj tuj legis la Verdiktan Akton:

**NATURA FLORO:** «Edeno retrovata», de Váldemar VINAR, el Ĉeĥoslovakio.

Subpremio: «Fulgo sur la neĝo», de Jiří KOŘINEK, el Ĉeĥoslovakio.

**JASMENO:** «Urbodomo de Stokholmo», de Clelia CONTERNO GUGLIELMINETT, el Italujo.

Subpremio: «Itako», de Harold BROWN, el Britujo.

**VILO:** «La Marmora mondo», de Johan HAMMOND ROSBACH, el Norvegujo.

Subpremio: «Ĉevaloj apokalipsaj», de Carmal MALLIA, el Malto.

**ORIGINALA PROZO:** «Tiu kurioza Alberto», de J. KOMEN-CEDEK, el Israelo.

Subpremio: «La forto de l' destino», de Ljuba BAJAGIEVA, el Bulgarujo.

**TRADUKA BRANĈO:** «Kantika provo en la templo», de Llibert Puig, el Katalunujo.

Petro Nuez akompanis la Reĝinon de la Festo, s-ino Diana Puig, al la ceremonio seĝo.

Ĉar la eksterlandaj premiitoj ne povis ĉeesti la feston, deklamis la premiitajn verkojn: Petro Nuez, Fernández Jurado, Joan Moretó, Llibert Puig, Joan Ramón Guiñón kaj Miguel Gutiérrez Aduriz.

Pastro Casanoves prezentis la Festparolantaron Ada Fighiera, ĉefredaktorino de «Heroldo».

Ada Fighiera en la festparolado rakontis pri sia travivado ekde kiam en Varsovio dum la milito okaze de demokratia festivalo oni dungis sin kiel tradukistino el la angla, kiun ŝi iom sciis. Ŝia familia lingvo estas Esperanto. Dum sia vivo ŝi loĝis en diversaj landoj kaj lernis multajn lingvojn. Nun la sepa estas la kastilia. Sed, kiam oni forlasas la grandajn hotelojn kaj estas surstrate oni estas perdita. La personoj, kiuj asertas, ke sufiĉas la angla kaj la franca forgesas, ke tiuj lingvoj estas parolataj de nur elitoj. Oni povas scii du, tri lingvojn, sed se oni ilin ne uzas, ilin forgesas. En ĉiu lando ŝi por iom aĉeti bezonis la helpon de la tieaj esperantistoj.

Pri la Floraj Ludoj ŝi memoris, ke

la fondinto de «Heroldo» Teo Jung gajnis premion en la Unuaj Florludoj en Barcelono okaze de la 5-a Internacia Kongreso en 1909.

Pri la popoloj ŝi diris, ke la interkompreniĝado en la mondo estas magra. La popolo ne parolas. La celo de vera interkompreniĝo estas, ke la popoloj interkompreniĝu.

Ŝi atestis, ke Esperanto estas la plej bona pontolingvo por la poezio. Menciinte la elsendojn en Esperanto de la Pola Radio, ŝi dankis —malrapide— por ke ĉiu povu kompreni».

Miguel Angel Altuna nome de KEA dankis la aŭtoritatojn, la Reĝinon, la Prezidantaron de HEF kaj la festparolantaron kaj el lia persona sento diris: «Mi envas vin pro la starigo kaj kontribuo al la esperanta kulturo. Pro tio, ĉiu esperantisto povas sin senti iom kataluna».

Tagmeze ni aliris al tipa restoracio por la komuna tagmanĝo.

Vespere S-ro Molera en la Aŭditorio projekciis kaj komentariis dia pozitivajn pri sia ĉeesto en Brazilio al la Ĉijara Kongreso de UEA.

Sukcesa Renkontiĝo. En la venonta jaro: Kien?

G. Moya

## ANONCO

---

Vi certe partoprenos la 67-an Universalan Kongreson de Esperanto 24-31 julio 1982 en Antverpeno, Belgio.

Sed vi certe ne volas loĝi en la grandurba periferio aŭ en luksega hotelo.

Mendu malmultekostan ĉamburon por la UK-tempo nepre jam nun!

Ni luis la 3 plej proksimajn hotelojn en Antverpeno por vi!

Nur 100 metrojn for de la kongresejo; tio signifas: neniu taksielspezo, neniu tempo-perdo, ebleco por dumtagaj ripozetoj kaj manĝetoj.

Prezoj: 1-lita ĉambro 245 DM; 2-lita ĉambro 448 DM por 7 noktoj, mantenmanĝoj kaj impostoj; kun duŝebleco sur la sama koridoro.

Ĉambroj kun duŝo aŭ banujo jam elĉerpitaj ekde novembro 1981.

Skribu al Esperanto-Centro, poŝtfolio 1450, D-4790 Paderborn (Ni peris UK-ĉambrojn jam en Varna, Luzern, Stockolm kaj Brasilia).

---

---

# Antaŭ la 42-a Hispana Esperanto Kongreso, okazonta en Málaga

## BONVOLE, ATENTU IOMETE

La venontan jaron ni havos gravan okazon por pritrakti, malsupre, la problemojn de nia movado, analizi la situaciojn por serioze labori kaj ĝoĝi pro prudenta optimismo. Pro tio, ni atentigas vin pri iuj aferoj de Esperantismo. Ĝin akceptu kiel inviton al pripenso kaj al aranĝo de la kunvenoj.

Laŭ mia humila opinio, nia ĉiutaga aktivado, kvankam tre bonkora, ne estas efika sufiĉe. Estas ke Esperanto mem havas universalan celon kaj devas aperi ĉiam kiel la lingvo de ĉiuj kaj por ĉiuj. Tamen, kaj pro tio, necesas memori ke ankaŭ la kulturaj elitoj devas esti alvokataj por partopreni aktive kaj entuziasme en la disvastigo de la Internacia Lingvo. Ĉio tio estas unu el la diskutendaj aferoj, ĉiutage kaj dum la 42-a Kongreso. Sed estas aliaj. Sekve mi intencas paroli pri kelkaj.

Kial la Movado ne antaŭeniras pli kare kaj fervore? En multaj urboj kaj urbetoj de nia lando oni parolas ofte pri Esperanto kaj ĝin oni instruas. Tamen, poste, kiam la gelernantoj forlasis la klasejojn malaperas tuta laboro de semado de la esperantistaj idealoj kaj, iom post iom, oni forgesas tiun kion oni lernis varme. Rilate al tio, mi pensas pri la efiko de oftaj kunvenoj de gesamideanoj. Laŭ mia opinio, estas nepre necese jen fondi esperantistajn klubojn jen eniri en tiujn estantajn kulturajn por tion realigi. Necesas pripensi multe pri ĉi tiu afero, ĉar ĝi estas baza por pli novajn kaj malnovajn gesamideanojn. La izoleco estas katastrofa, ĉefe al mornaj spiritoj.

Plaĉus al mi ke en la Malaga Kongreso, aŭ antaŭe se estas eble, oni pritraktu la konvenecon eldoni kvalitan esperantan revuon hispanan. La gesamideanoj ĝin bezonas pro multaj motivoj kaj, eble, ĉefe por entuziasme ĝin montri fiere al siaj geamikoj.

Same oni devas paroli pri esperantajj elsendaĵoj de Nacia Radio de Hispanio. Ili necesas por disvastigi niajn lingvon kaj idealon, kunigi la esperantistojn kaj pruvi al la ceteraj ke Esperanto ne estas io ebla, sed reala maniero de facila interkomunikado.

Kiel ĉiuj ni scias, dum la proksima Kongreso okazos prelegon kaj seminariojn pri Esperantismo, Instruado de Esperanto kaj Fakaj aktivadoj. Mi invitas ĉiujn personojn zorgantajn pri nia Movado partopreni en la kunvenoj kaj diri ĉion kion ili pensas pri tiuj temoj. Ankoraŭ, kompreneble, ne estas elektitaj la prelegontoj kvankam la temoj jam estas elektitaj. Tamen, bonvolu skribu kaj sendu vian korespondanĉon al «apartado 354» de Málaga sciigante pri viaj sugestoj kaj opinioj. Ĉiuj ni povas kaj devas manifesti kion ni opinias pri la nomitaj prelego kaj seminarioj, la radiaj elsendaĵoj en Esperanto kaj la revuo.

Ni kunvenu en kulturajn klubojn por pritrakti niajn aferojn, amikigi kaj atesti antaŭ la popolo la veron de nia idealo.

Andrés Martín  
PREZIDANTO DE L.K.K.

# TRADUKBANKO

## EKFUNKCIIS

La ideo estis unuafoje skizita en Boletin n-ro 237-a. Laŭ la tiama artikolo, hispana tradukbanko konsistis esence en deponejo al kiu ĉiu tradukanto sendus siajn prilaboraĵojn. Tiel, ĉiuj tradukoj estus konvene arkivitaj kaj listigitaj, iu ajn povos informiĝi pri kio estas jam tradukita, kaj la laboro de multaj sindonemaj esperantistoj ne perdiĝos por ĉiam en tirkestoj aŭ en neniam plu konsultataj malnovaj revuoj; krome, la tradukitaj tekstoj povus esti eventuale uzataj por publikado.

En la 40-a Hispana Kongreso, oni supraĵe preparolis la temon, kiu ŝajne vekis ies intereson. Inter la ĉeestantoj troviĝis membro de la patronaro de FUNDACION ESPERANTO, kiu promesis proponi por studo al la fondaĵo la ideon, ke TRADUKBANKO estu patronita de tiu oranizaĵo; tamen, ĝis nun venis nenia reago far la respondeculoj de la fondaĵo. Certe, pli rektaj kaj klaraj kontaktoj estos baldaŭ entreprenataj.

Ekde la lanĉo de la ideo ĝis nun, la teamo «Juan Azcúenaga Vierna-Miguel Gutiérrez Aduriz» laboras super la ideo laŭ disponeblaj eblecoj; tiel, danke al la netaksebla helpo de la HISPANA ESPERANTO-MUZEO, oni komencis la fotokopiadon de ĉiuj tradukoj aperintaj en diversaj malnovaj revukolektoj troviĝantaj en la muzeo. Ankaŭ menciindas la helpo de KATALUNA ESPERANTO-ASOCIADO rilate parton de la katalunlingvaj

tradukoj. Fine aldonendas, ke rezulte de la ĝisnuna laboro aperis jam en Boletin n<sup>o</sup> 243-244-a la artikolo **Garcia Lorca en Esperanto** kaj en Boletin n-o 247 **Tradukoj aperintaj en «Nova Sento»** kaj troviĝas jam preta la artikolo **Cervantes en Esperanto**.

La sekvantaj paŝoj estos interalie la jenaj:

Unue, ordigi la kolektitan materialon, kiu estos klasifikita kaj arkivita en specialaj tekoj.

Due, funkciigi servon kies celo estos la vendado, laŭ mendo, de fotokopioj de la arkivita materialo.

Trie, starigi kampanjon por kolektado de manuskriptoj, kun la duobla celo zorgi pri ties konservado kaj publikigado.

Kvare, atingi patronadon far la plej grava Esperanto-institucio en nia lando, FUNDACION ESPERANTO.


Kvine, studi la eblecojn havigi al T.B. la necesajn monrimedojn por ties glata disvolviĝado.

La estonta agado kondukos TB-on al riĉa kolekto de materialo preparita jen laŭ aŭtoroj, jen laŭ tradukistoj, jen laŭ temoj, jen laŭ epokoj ktp., kio cetere ebligos la eldonadon de antologio aŭ iaj literaturaj poŝlibroj, laŭ financaj eblecoj.

Ni daŭre esperas ricevi reagojn, konsilojn, kunlaboron kaj ĉiaspecan helpon, eĉ monan.

**Miguel Gutiérrez Aduriz**

# INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ



**Esperanto-Kongreso de I.F.E.F.**  
Kiel anoncite en Regensburg pasintjare, la 34-a I.F.E.F. kongreso okazos en la hungara urbo **Balatonfüred**, apud la Balaton Lago. Tre grava estas la fakto sendi la aliĝilon kaj la aliĝkoton antaŭ la 1-a de aprilo 1982-a. En la urbo **Balatonfüred** estas je via dispono ĉambroj dulitaj, kaj la prezo de la ĉambrokotizo inkluzivas la matenmaĝon, tagmanĝon kaj vespermanĝon. En la kongresejo mem la nombro de litoj estas limigita, pro tio estas konsilinde baldaŭ mendi ilin.

La postkongreso okazos en **Budapeŝto** la 8-an kaj 9-an de majo 1982-a. Pri la programoj kaj postkongreso, vi estos informataj per la revuoj «Internacia Fervojisto» kaj «Hungara Fervojista Mondo».

**38-a Internacia Junulara Kongreso.**—Okazos en **Leuven** (Belgujo) de la 31-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto 1982-a.

La urbo **Leuven** estas vera subĉiel-la arkitektura muzeo. Precipe elstaras la gotika urbodomo, plena je harmonio kaj eleganteco ekstere kaj interne. Krome, vagante tra la multjarcentaj stratoj vi malkovros tre kuriozajn restaĵojn de fora pasinteco. **Leuven** proponas al vi samtempe modernan urbon kaj kvietan, ĉarman oazon. En la urbo troviĝas unu el la plej malnovaj Universitatoj de Eŭropo, fondita en la 15-a jarcento.

La programo estas alloga: Filmon pri **Leuven**, ekskurson tra la urbo kaj cirkaŭaĵoj sportajn konkursojn, flandran foiron, k.t.p.

La temo de la Kongreso estas «**Rilato inter Scienco kaj Socio**». La kongresejo konsistas el pluraj konstruaĵoj, la plej multaj situantaj en belega parko.

**Seminario pri Sporto.**—Okaze de la Monda Futbala Ĉampionludo okazonta venontjare en Hispanujo, Madrida Esperanto-Liceo kun la aŭspicio de la Hispana Esperanto-Federacio organizos de la 7-a ĝis la 11-a de Julio Internacia Sporta Seminario en la internacia lingvo sub la ĝenerala titolo: «**Internacia Seminario pri la sporto en la moderna socio**».

La programo antaŭvidas serion de mallongaj diskut-kunvenoj pri la jenaj temoj: Sporto kaj juro, sporto kaj sociologio, sporto kaj medicino, sporto kaj literaturo, historio de la sporto, lingva problemo en la sporto, k.t.p.

Por organizi la Seminarion jam formiĝis la Organiza Komitato prezidita de S-ro G. C. Fighiera.



# NIA HISTORIO (1947-a - 1981-a) ENKONDUKO

La forpaso de samideano Sebastiano Chaler, unu el la fondintoj de HEF en la jaro 1947, startis en la membroj de HEF-Redakcio, verki resuman kronikon pri niaj elstaraj pioniroj, kiuj silente kaj konstante kreis la bazon de: nia movado, nia literaturo kaj nia estonteco.

Sed, ni trovis tiel grandan amason da datoj kaj nomoj ke BLINDUMITAJ, oni devis resumi niajn informojn tiagrade ke vi trovos multajn mankojn en la sekvanta «Nia Historio».

La Redakcio konscias ke nia laboro estas tre modesta, tamen esperas ke ĉi tiu guto, instigos aliajn samideanojn verki pli serioze kaj vaste pri «Nia Historio».

S. Aragay

## 1947

Fondiĝas Hispana Esperantista Federacio (HEF)

Prezidanto Daniel Llorens Sastre el Valencio

Vicprezidanto José Anglada Prior el Barcelono

Sekretario Vicente Santamaría el Valencio

Vicsekretario Sebastián Chaler Arnau el Terraso

Kasisto Francisco Roglá Orrico el Valencio

Voĉdonanto José Guzmán Guzmán el Valencio

Voĉdonato María Casanovas Jarreta el Zaragozo

Voĉdonato Miguel Rivas de Pina Vives el Santandero

Voĉdonato Fernando Montserrat Boronat el Barcelono

Fondiĝas «Lingua Club» en Manreso, unika E-asocio oficiala en Katalunio.

## 1948

Plifirmiĝas la Esperanto-Movado kaj oni organizas diversajn E-Sekciojn interne de kulturaj kaj sportaj asocioj.

Esperanto-Grupo «Frateco» en Zaragozo daŭrigas sian agadon.

## 1949

Aperas «BOLETIN» organo de HEF, dulingve, en kastilia kaj esperanta lingvo; redaktoro L. Hernández.

Organiziĝas Kuracista Esperanta Asocio (KEA), prezidanto Llorens Sastre.

Mortas V. Inglada Ors

Prezidanto de HEF M. Caplliure.

## 1950

HEF atingas la Unuan Premion de UEA-Konkurso.

Mortas J. Grau Casas.

«BOLETIN» ampleksiĝas je 12 paĝoj. Komenciĝas E-Movado en Sabadell en la ekskursiva societo «Terra i mar».

## 1951

Prezidanto de HEF D. Llorens.

Unua Literatura Konkurso de HEF.

Okazas en Terraso la 12-a Hispana Kongreso de Esperanto, la unua post la hispana civila milito.

Régulo Pérez fondas la eldonejon «Stafeto».

## 1952

Oni inaŭguras la unuan E-programon en nia lando je Radio S.E.U. de Madrido.

Régulo Pérez organizas E-kursojn en la Universitato La Laguna, Tenerife.

13-a H.E.K. en Valencio.

Komenciĝas E-Kursoj pere de Korespondado, prizorganto Ramón Molera de Moiá.

J. Bremón Masgrau eldonas la lernolibron «El Esperanto al alcance de todos».

Stafeto eldonas la verkon «Kvaropo». Jaime Miró kaj F. Vilá organizas E-Klubon «Aŭroro» en Barcelono.

Valencia radiostacio «Radio Alerta» disponigas 20 minutojn por E-elsendo.

## 1953

La hispana gazetaro daŭre informas pri Esperanto.

HEF kongresas en Bilbao.

Stafeto eldonas la verkon «La bapto de caro Vladimir».

Valenciaj geesperantistoj ariĝas okaze de festo, ĉe la strato «d-ro Zamenhof» inaŭgurita la jaron 1934-a.

Fondiĝas E-Grupo «Verda Kolombejo» en Ciaño-Santa Ana, Oviedo.

## 1954

Organiziĝas du sekcioj de HEF, Blindula Esperantista Organizaĵo kaj Fervojista Asocio Esperantista.

La 27-an de februaro oni omaĝas al eksredaktoro de HEF-Boletín L. Hernández.

F. Soler y Valls reeldonas la verkon «Elementos de Esperanto».

15-a Hispana Kongreso de Esperanto en Zaragozo.

Nova E-grupo estas fondata en San Feliu de Codinas.

Fondiĝas la Grupo esperantista de Educación y Descanso en Santandero.

## 1955

Prezidanto de HEF D-ro Rafael Herrero, el Valencio.

HEF kongresas en Gijón.

Ekorganizado de Junulara Hispana Sekcio en Moiá, Katalunio.

Stafeto eldonas la verkojn: «El la maniko», «Koko krias jam!» kaj «Kontralte».

L. Hernández eldonas la verkon «La malprudenta scivolulo».

Madrida Esperanto-Klubo organizas la plej grandan E-Ekspozicion en la Nacia Biblioteko.

Radio Bilbao komencas elsendi en Esperanto.

Fondiĝas la klubo kanaria E-Grupo en Las Palmas de Gran Canaria.

## 1956

26-a Internacia Kongreso de IKUE en Zaragozo.

HEF kongresas en Barcelono.

Stafeto eldonas la verkojn: Eŝeoj I. Beletro» kaj «La infana raso».

L. Mimó eldonas la verkon «Lernolibro de Esperanto».

Delfi Dalmau eldonas la verkon «Dialekto, Dialektiko».

Inaŭguras straton «Zamenhof» en Cheste.

E. Tudela Flores eldonas la vortaron «Español-Esperanto».

Fondiĝas E-grupo de la Sindikata Organizaĵo «Educación y Descanso» en Valencio.

Fondiĝas E-Klubo en Vitoria.

Grupo Esperantista de Bilbao festas sian 50-jarecon.

La Ministerio pri Edukado, oficialigas Esperanto-Kurson per Korespondado gvidata de R. Molera.

## 1957

L. Hernández denove redaktas la organon de HEF «Boletín».

Hispana esperantistaro kongresas en Madrido.

En Sabadell kunvenas la katalunaj esperantistoj okaze de la 1-a Barcelona Esperantista Renkontiĝo.

Stafeto eldonas la verkojn: «La floroj de l'malbono», «Jozefo», kaj «La vivo de la plantoj».

Geesperantistoj de E-grupoj kaj E-sekcio de: Kooperativo de Manteksistoj «Stelo de Paco», Kooperativo la Formiko «Aŭroro», «Casa de Almería», «Casa de Valencia», «Nigra Monto», «Peña Cultural Barcelona» kaj «Radio Club de Cataluña» ĉeestas kunvenon prezidata de Atanasio Sinués, kun la celo fondi asocion «Instituto de Esperanto».

## 1958

Grupo Frateco de Zaragozo, festas sian oran jubileon.

Aperas la literatura premio «Comellas - Bassols».

Stafeto eldonas la verkojn: «Esperanta Antologio» kaj «Songe sub pomarbo».

F. Soler y Valls reeldonas la lernolibron «Elementos de Esperanto».

19-a Hispana Kongreso de Esperanto en Castellón.

Inaŭguras straton «Zamenhof» en Manreso.

## 1959

HEF kongresas en Malago okaze de la 20-a Hispana Kongreso de Esperanto.

La B.E.R. okazas en Vilafranca del Penedés kaj inaŭguras straton «Zamenhof».

Pli da 250 lernantoj atingas la Kurson per Korespondado.

HEF-Bulteno fariĝas 24-paĝa sed dumonata.

Fervore oni festas la 100-an datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Stafeto eldonas la verkojn: «Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj», «Ŝtupoj sen nomo», «Pinta kraĵono», «Nepalo malfer-

mas la pordon», «Eroj kaj aliaj poemoj» kaj «La bela subtera mondo».

E. Tudela Flores eldonas la vortaron «Esperanto-Español».

La urboj Fuentes de Ebro, Sabadell kaj Cheste inaŭguras straton «Zamenhof», kaj la urbo Terrasso inaŭguras placon «Zamenhof».

Estas oficialigata nova sekcio de HEF, ĝia junulara sekcio je la nomo de HEJS, prezidata de S. Araguay.

M. Cantalapiedra fondas E-grupon «Fido kaj Espero» en Valladolido.

## 1960

Mortas J. Bremón Masgrau. HEF kongresas en Pontevedro.

L. Hernández ne plu redaktas la HEF-Bultenon, estas organizata Redakcia Komitato.

Stafeto eldonas la jenajn verkojn: «Reĝo Edipo kaj Antigona», «Topaze», «Otelo», «Nur tri koloroj», «Vitralo», «Junaĝa verkaro» kaj «Unufingraj melodioj».

28-a Internacia Foiro de Barcelono, eldonas sian oficialan afiŝon en Esperanto.

## 1961

Mortas L. Hernández. En Palma de Mallorca kongresas HEF.

L. Mimó eldonas la verkon «Perfekto de la Esperanta Verboj».

Stafeto eldonas la verkojn: «Ombroj de la kvara dimensio», «Reehoj», «Nova Ezopo», «Proverbaro Esperanta» kaj «La Zamenhofs Esperanto. Simpozio pri -ata -ita».

La Laguna (Tenerifo) inaŭguras straton «Zamenhof».

13-a I.F.E.F. kongreso en Barcelono.

## 1962

Oni kreas novan sekcion de H.E.F. nomata informoficejo, Hispana Es-

peranto Kongreso okazas en Valladolido, kie oni inaŭguras straton «Esperanto».

1-a Hispana Junulara E-Renkontiĝo en Sabadell.

Organiziĝas Literatura Konkurso omaĝe al L. Hernández.

Prezidas en HEF D-ro Miguel Sancho Izquierdo, el Zaragoza.

Stafeto eldonas la verkojn: «Zamenhof, aŭtoro de Esperanto», «Specimene, Parodioj kaj pastičoj», «Planlingvaj problemoj. Esperanto kaj la naturalismo», «La profeto», «Ĝingita glavo», «Egzilo kaj azilo», «Provo alfronti la vivon» kaj «Aventuroj de pioniro».

Zaragozo inaŭguras straton «Zamenhof».

La firmao «Codorniu» eldonas broŝuron en Esperanto.

La prezidanto de Instituto de Esperanto, Jaume Aragay festparolas okaze de la inaŭguro de strato «d-ro Zamenhof» en Barcelono.

## 1963

La sidejo de HEF translokiĝas de Valencio al Zaragozo.

Hispana esperantistaro kongresas en Barcelono.

E. Tudela Flores eldonas la verkon

«Diccionario Elemental Español-Esperanto».

Fondiĝas Ordizia E-grupo en Villafraanca de Oria.

L. Mimó eldonas la verkon «Decidaj Argumentoj».

Stafeto eldonas la jenajn verkojn: «Kiel akvo de l'rivero», «Homoj sur la tero», «Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud», «Duonvoĉe», «Sen paraŝuto» kaj «Sub stelo rigida».

La Instituto de Esperanto sanĝiĝas en Hispana Instituto de Esperanto.

En la Universitato de La Laguna, fondiĝas oficiale «Katedron de Esperanto».

Mortas Rafael Gastón.

## 1964


Valencio gastigas la 25-an Hispanan Kongreson de Esperanto kaj la 30-an Internacian Kongreson de IKUE.

6-a Barcelona Esperantista Renkontiĝo en Vilanova i la Geltrú.

Stafeto eldonas la verkojn: «Maŝimondo kaj aliaj noveloj», «El tero kaj etero», «Sur la vivovojo», «33 rakontoj. La Esperanta novelarto», «Soifo» kaj «Hamleto, princo de Danujo».

Hispana Esperanto-Kongreso en Barcelono





Hispana Esperanto Muzeo en Sant Pau d'Ordal

La Entrepreno E. Anglada fabrikas kaj disvendas ĉampanon «Esperanto», natura ŝaŭmvino.

## 1965

Estas fondata la Biblioteko kaj arkivo de HEF.

26-a Hispana Esperanto Kongreso en Palencio.

Mortas Pastro Casanovas kaj D. Dalmau.

Okazas 7-an Barcelona Esperantista Renkontiĝo en Molins de Rey.

Stafeto eldonas la verkojn: «Maskerado ĉirkaŭ la morto», «Martín Fierro», «Japana kvodlibeto» kaj «Romeo, Julieta kaj la tenebro».

Palencio kaj Torrevellilla inaŭguras straton «Esperanto».

La Subsekretario pri Informado kaj Turismo eldonas la libron «Hispanion por vi».

La prezidanto de HEF Sancho Izquierdo, Doktoro «Honoris Causa» de la Universitato de Navarra.

## 1966

Luis María Hernández Izal kreas «Hispanan Esperanto-Muzeon» en Sant Pau d'Ordal.

8-a B.E.R. en Sant Feliu de Codinas kie oni inaŭguras straton «Zamenhof».

En Bilbao, okazas la 27-a Hispana Esperanto Kongreso kaj oni inaŭguras straton «Esperanto».

Fondiĝas Esperanto-Sekcio en «Klubo de Amikoj de UNESKO» en Barcelono, gvidas ĝin M. Vilagrán. Stafeto eldonas la verkon «Vojaĝo inter la tempoj».

## 1967

Zaragozo gastigas la 28-an H.E.K-on. Ripollet organizas la 9-an B.E.R-on kaj inaŭguras straton «Zamenhof».

Stafeto eldonas la verkojn: «Fajro sur nia koro», «Vesperkanto», «Somermoznoka sonĝo», «Vivo de Gandhi», «Norda Naturo», «El polvo de la tero» kaj «Arĉoj».

Eldonejo SOPENA eldonas en sia serio LEXICON la vortaron «Esperanto-Español kaj Español-Esperanto» kun gramatikaj klarigoj; preparis ĝin A. Paluzie kaj P. Nuez.

Oni konstruas en Monistrol de Montserrat, junularan restadejon gvidata de HEJS.

Foiro de Barcelono reeldonas afiŝojn en Esperanto kaj akceptas organizi standon pri Esperanto senpage.

## 1968

53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrido, honora prezidanto Ŝtatestro Francisco Franco; kiel speciala libro por la U. K. estas eldonata la verko «Soleco» de la fama verkistino V. Catalá, tradukis ĝin J. Ventura.

E-Klubo Aŭroro transformiĝas en E-klubo Foment Martinec.

36-a Internacia Kongreso de Blinduloj en Madrido.

10-a B.E.R. en Sant Pau d'Ordal, oni inaŭguras straton «Zamenhof».

2-a Provinca E-Kunveno en Girono.

24-a I.J.K. de TEJO en Tarragona, oni inaŭguras straton «Zamenhof» en Tarragono kaj Monistrol de Montserrat kaj la rifuĝejon «Junulara Restadejo Esperantista» en Monistrol.

Stafeto reeldonas la verkon «La infana raso».

Fondiĝas Centro de Esperanto en Sabadell.

## 1969

29-a Hispana Kongreso de Esperanto en La Laguna.

Fondiĝas «Fonduso Esperanto», prezidata de HEF-prezidanto.

11-a B.E.R. en Les Fonts de Terraso.

Valencia E-Renkontiĝo en Cheste.

Startas la literaturaj konkursoj de «Fonduso Esperanto».

Redaktorino de HEF-Bulteno, Inés Gastón.

Internacia Renkontiĝo en Perpignan.

Prezidanto de HEF Angel Figuerola. Stafeto eldonas la verkojn: «Humoroj», «Eta vivo» kaj «Kantoj kaj romanoj».

11-a Literatura Konkurso premio «Comella Bassols».

Estas inaŭgurataj stratoj «Esperanto» en la urbo: Girono, Les Fonts de Terraso kaj Santa Cruz de Tenerife.

## 1970

Sidejo de HEF en Madrido.

2-a Franca-Hispana E-Renkontiĝo en Jaca.

30-a H.E.K. en Mieres.

Mortas M. Solá kaj F. Vilá.

Organiziĝas nova sekcio de HEF, ĝi estas «Hispana Turisma E-Sekcio, prezidas en ĝi Inés Gastón.

Valencia Esperantista Renkontiĝo en Gandía.

Oni kreas specialan fonduson por aĉetado de HEF-sidejo en Madrido.

Stafeto eldonas la verkojn: «La tempesto» kaj «Bona ŝanco».

Inaŭguras straton «Esperanto» en Manlleu.

Iberia eldonas informfoliojn en Esperanto.

12-a B.E.R. en Manlleu.

## 1971

31-a H.E.K. en Alicante.

Grava librodonado por la biblioteko de HEF, fare de R. Fiol kaj C. Martínez.

13-a B.E.R. en Sant Cugat del Vallés kie oni inaŭguras straton «Esperanto».

Estas inaŭgurata strato «Esperanto» en Benidorm.

Pedro Nuez eldonas facilan lernolibron «Curso elemental de Esperanto».

1-a Astura Esperantista Kunveno en Gijón.

Stafeto eldonas la verkojn: «Kun siaspeca spico!», «Invit' al japanesko», «Cigana Romancaro» kaj «Senĝenaj dialogoj».

## 1972

- Aperas «Kun sopira Koro» kaj «La arbo de la sciado» tradukitaj de F. de Diego.  
Stafeto eldonas la verkojn: «Ni kaj Ĝi. Eseoĵ III. Pri religio kaj arto» kaj «Volo kaj vorto».  
14-a B.E.R. kaj inaŭguro de strato «Esperanto» en Riells de Fai.  
32-a H.E.K. en Vigo.  
Franca-Hispana Renkontiĝo en Pau. Dua Premio «Francisco Máñez».  
HEF aĉetas oficejon en Madrido kun la celo posedi propran sidejon.

## 1973

- 5-a Franca-Hispana Renkontiĝo en Bilbao.  
33-a H.E.K. en Madrido.  
15-a Kataluna Esperanto-Renkontiĝo en Calella.  
Stafeto eldonas la verkon «Esploroj».  
Firmao «Escudo de Oro» eldonas poŝtkartojn kun teksto en Esperanto jena, «La poŝtkarto de la amikeco».

## 1974

- 26-a Internacia Fervojista E-Kongreso en Tarragono.  
L. Mimó eldonas la verkon «Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto».  
34-a H.E.K. en Valladolido. Mortas E. Tudela Flores.  
6-a Franca-Hispana Renkontiĝo en Biarritz.  
Stafeto eldonas la verkojn: «Ni devas vivi» kaj «El la vivo de Bervalda sentaŭgulo».  
16-a K.E.R. en Cervera kaj inaŭguro de strato «Esperanto».  
Calella inaŭguras straton «Esperanto».  
F. Zaragoza organizas hispanan sekcion de I.L.E.I.  
Hispana E-Muzeo, inaŭguras propran sidejon en Sant Pau d'Ordal.

## 1975

- 1-a HEJS-Tendaro en Zaragozo.  
Hispana E-Muzeo kaj Centro de Esperanto Sabadell kreas la premion «Klara Silbernik».  
17-a K.E.R. en Girono. Okaze de la 35-a H.E.K. oni inaŭguras en Lérida straton «Zamenhof».  
Fondiĝas kultura revuo «Horizonto».  
Ricard Güell eldonas la verkon «Malsupra Tero».  
Stafeto eldonas la verkon «Patrino Koro».

## 1976

- 17-a Internacia Fervojista E-Skise-majno en «La Molina».  
Akceptas la Redakcion de HEF-bul-teno S. Aragay.  
L. Mimó eldonas la verkojn de C. Soldevilla: «Tamen civilizitaj» kaj «Negobulo» en unu volumo.  
Eldonejo OIKOS-TAU eldonas hispane la verkon de Pierre Janton «El Esperanto».  
18-a K.E.R. en Valls, estas inaŭgurata strato «Esperanto».  
8-a Franca-Hispana Renkontiĝo en Lourdes.  
Organiziĝas Kunordiga Komitato de HEF en Katalunio kaj prezidas ĝin Pedro Nuez.  
36-a HEK en El Ferrol.

## 1977

- Aperas «La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha» de Cervantes, tradukita de F. de Diego kaj eldonita de F.E. dank'al donaco de familio Manteca.  
Oni inaŭguras straton «Esperanto» en Villacañas (Toledo).  
37-a H.E.K. en Sabadell. 19-a K.E.R. en Cornellá kie oni inaŭguras straton «Esperanto».  
12-a eldono de «El Esperanto al alcance de todos», de F. Soler.  
Mortas Rafael Herrero.  
Félix Navarro eldonas la libron «Esperanto Curso Práctico».

Fondiĝas Barcelona Esperanto-Centro, prezidata de S. Aragay.

Inaŭguras komercan entreprenon «Libreria Esperanto», en Barcelono.

Centro de Esperanto de Sabadell inaŭguras propran sidejon malavare donacitan de A. Galbany de Criach.

## 1978

38-a H.E.K. en Leono kaj 20-a K.E.R. -18-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazas en Tortoso.

HEF-sidejo translokiĝas al Valladolido, prezidas en HEF M. Rafaela Uruña.

## 1979

«Heroldo de Esperanto» translokiĝas al Madrido.

39-a H.E.K. en Gijón. 21-a K.E.R. 19-aj I.F.L. okazas en Rubí, sekretario de la Internaciaj Floraj Ludoj G. Mora i Arana.

Oni organizas societeton «Kataluna Esperanto-Asocio», prezidanto M. Casanoves. Firmao Sagarra Bascompte S. A. disvendas oleon «Esperanto».

Eldona Fakto de HEF, eldonas libron pri la «premiitaj verkoj de la 18-aj Internaciaj Floraj Ludoj».

Centro de Esperanto en Sabadell, reinaŭguras Avenuon «Zamenhof», tiu avenuo estis inaŭgurita la jaron 1912-a.

Kastilia Renkontiĝo en Palencio.

## 1980

8-a Valenciana Esperantista Renkontiĝo en Buñuel kie estas inaŭgurita strato «Zamenhof».

40-a H.E.K. en Madrido. Oni reorganizis HEJS.

Oni organizas la 4-an HEJS-Tendaron en Gandia.

1-a Esperantista Renkontiĝo en El Ferrol.

Fondiĝas «Hispana Esperantista

Asocio, Anton Balagué» prezidas en ĝi L. Serrano.

22-a K.E.R. kaj 20-aj I.F.L. en Vilanova i Geltrú.

F. Zaragoza Ruiz eldonas la lernolibron «Una Lengua para Todos». Estas eldonata la verko «La Iglesia y el problema de la lengua Auxiliar Internacional» Eldonejo Claret.

14-a Esperantista Renkontiĝo de la Orienta Regiono en Murcia.

Grava Omaĝo al D-ro Sancho Izquierdo, Honora Prezidanto de HEF, en Zaragoza.

## 1981

41-a H.E.K. en Murcio. 5-a HEJS-Tendaro en Elche.

Callosa de Segura inaŭguras straton «Esperanto».

Okaze de la 75-a datreveno de la fondiĝo de Bilbaoa Esperanto-Grupo, ĝi organizas «Internacion Esperantista Renkontiĝon». Mortas M. Manteca López.



Madrida Esperanto-Liceo organizas 3-an Internacian Literaturan Konkurson.

23-a K.E.R. -21-aj I.F.L. en Moia.

Aperas «SOCIAL-HUMANISTA», du-lingva gazeto eldonata en Terras-

so, ĉefredaktoro Giordano Moya. 9-a eldono de la facila lernolibro de Pedro Nuez «Curso Elemental de Esperanto».

Mortas Sebastiano Chaler, unu el la fondintoj de HEF.

V. H. Llusera, L. Serrano, S. Aragay



---

# NIAJ GRUPOJ

---

**BILBAO.**—La Bilbao E-Grupo aranĝis novan kurson, kiu komenciĝis la 5-an de Oktobro, kaj oni supozas la finon meze de decembro. Per tiuj mallongaj kursoj, la gelernantoj akiras bazan nivelon, por rekomenci post decembro progresigan kaj konversacian kurson.

Por la veteranaj esperantistoj, la tagoj por kunveni en la Grupejo estas la lundoj kaj ĵaŭdoj.

Kiel novaĵo, ni sciigas ke ĉijare nia estrarano s-ano Artur Bastida estas preta instrui Esperanton vasklingve, ĉar, laŭŝajne ni neniam faris tion, ni konsideras la aferon tre interesa sperto por nia Grupo.

**ZARAGOZA.**—La Esperantista Grupo «Frateco» organizas en Zaragoza du kursojn por komencantoj, plie unu superan kaj alian praktikan.

Kunlabore kun la gepatroj de la lernantaro de Nacia Kolegio oni aranĝis kurson por komencantoj kaj alian perfektigan.

**Seminarioj.**—Kiel en pasintaj jaroj, niaj Seminarioj okupos la vesperon de ĉiu vendredo. Novaĵo ĉijare estas ke nur la lastan vendredon ĉiumonate prelegos la veteranoj dum la restantaj vendredojn prelegos la junuloj, kiuj organizos ĉion: Prelegojn, rakontojn, deklamojn, ĉion amuze, distre kaj kompreneble, esperantlingve.

**VALLADOLID.**—Kiel kutime en Oktobro, la Esperantista Grupo «Fido kaj Espero», komencis Elementan Kurson, gvidatan de nia entuziasma samideano Mauro López Nalda. La Elementa Kurso komenciĝis la 14-an de Oktobro kaj ĝi okazas lunde, merkrede kaj vendrede je la oka vespere.

Por la progresantoj, la kunvenoj por praktiki la lingvon okazas marde kaj ĵaŭde, kaj la junulara sekcio de la Grupo nomata «Kerno» kuniĝas speciale unu fojon semajne.

**Projekcio de diapozitivoj.**—Kiel komencon de la aktivaĵoj de nia Grupo, la 13-an de Oktobro, S-ro Luis Martín Herrero, Prezidanto de la Grupo, projekciis kolorajn diapozitivojn pri Tailandio, Nepalo kaj Hindio, kun ĉeesto de amaso da membroj de nia Grupo kiuj plenplenigis la salonon.

**Prelego.**—Daŭrigante la kutimon prelegi dum la kursoj la lastan mardon de ĉiu monato, nia samideano Luis Hernández, sekretario de H.E.F., la lastan mardon de Oktobro prelegis pri «La Universala Kongreso de Esperanto en Brazilio». La temo estis prezentita situante geografie kaj historie Brazilon kaj la ĉefurbon Brazilon, montrante al la ĉeestantoj per landkartoj kaj hemisferkarto la situacion de tiu lando.

Poste, li parolis pri la Kongreso mem, sukceso kaj signifo de tiu kongreso okazinta unuafoje en la suda hemisfero, kaj kuraĝigis la esperantistojn partopreni iam en Universala Kongreso, kaj pro la pli granda proksimeco al nia Lando, li admonis ilin partopreni en la venontjara Universala Kongreso okazonta en Antverperno (Belgio). Fine la ĉeestantoj demandis al li pri diversaj aspektoj de la kongresoj kaj speciale pri tiu de Brazilo. Je la 9-a vespere finiĝis la kunveno per tondra aplaŭdado.

**ALICANTE.**—En la Socia Centro de la Ministerio pri Kulturo komenciĝis en Oktobro du Elementaj Kursoj, lunde, merkrede kaj vendrede kaj Perfektiga Kurso ĉiujfaŭde.

**VALENCIA.**—La 17-an de Oktobro kaj kun ĉeesto de pli ol 75 gesamideanoj okazis la inaŭguro de la nova sidejo de la Esperanto-Grupo de Valencia situanta en Gran Via Fernando el Católico, 45 3<sup>o</sup>. Post la bonvenigaj salutvortoj de la Prezidanto de la Grupo S-ro Juan Bosch, parolis S-ino Ada Fighiera-Sikorska, redaktoro de la prestiĝa periodaĵo «HEROLDO DE ESPERANTO», kiu rakontis al ni siajn spertojn kun nia lingvo ESPERANTO. Sekve S-ro Gian Carlo Fighiera, de la Monda Turisma Organizo prelegis pri tre interesa temo «Faktoroj kiuj favoras kaj faktoroj kiuj malfavoras la internacian oficialigon de Esperanto». Sekvis la salutvortojn de reprezentantoj de aliaj grupoj de Esperanto kaj fine S-ro José Luis Ruiz del Puerto gitarludis diversajn komponaĵojn.

Ni gratulas niajn samideanojn de Valencia por la nova sidejo kaj ni esperas ke ĝi permesos al ili daŭre kaj aktive labori por la progreso de Esperanto en Valencia.

**CARTAGENA.**—La 10-an de Oktobro kaj organizita de la loka E-Grupo «Cartago-Nova» okazis en la Kultura Salono de la Provinca Sparkaso de Murcia en Cartagena la oficiala inaŭguro de la Esperanta Kurso 1981-a-1982-a.

Inter la ĉeestanta publiko kiu plenigis la salonon, ni elstaras la ĉeeston de la Delegito de Kulturo kaj Sporto; la Direktoro de la Sparkaso, la Vicsekretario de la Urba Konsilantaro nome de la Urbestro de Cartagena.

Prezidis la eventon S-ino Ana María Hernández Ros-Codorniu akompanata de la tuta estraro de la Grupo «Cartago-Nova». S-ino Hernández Ros-Codorniu per trafaj vortoj prezentis S-ron Francisco Zaragoza, Vicsekretario de I.L.E.I. kaj estrarano de H.E.F., kiu prelegis pri la utileco de la internacia Lingvo Esperanto, kaj S-ron Francisco Sánchez Antón, profesoro de Esperanto kiu kuraĝigis ĉiujn lerni Esperanton. La aranĝon finigis S-ino Hernández Ros-Codorniu per karaktera improvizata kanteto.

Pere de ĉi tiu linioj ni esprimas nian dankemon al la Sparkaso de Murcia en Cartagena kiu helpas la esperantistan movadon en Cartagena, ne nur morale, sed ankaŭ finance.

**GERONA.**—De la 24-an de Oktobro ĝis la 1-an de Novembro kaj en la kadro de la Girona Foiro, la loka E-Grupo «Girona Espero» prezentis standon bele ornamita per kurtenoj, arbustoj kaj afiŝoj afable pruntedonitaj de Kataluna E-Asocio. Ankaŭ funkciis libro-servon kaj oni informis pri Esperanto al pluraj interesuloj, ĉefe gejunuloj. Dum la okazigo de la Foiro kaj per Radio Girona estis interjuataj pri Esperanto S-ro Puig de Sabadell kaj S-ro Masías de Girona. La evento estis tre pozitiva por la diskonigo de Esperanto en la regiono.

En la proksima urbeto Flassa, S-ro J. Geli instruas esperanton al 15 gelernantoj.

**GIJON.**—La 5-an de Oktobro komenciĝis en la sidejo de la Astura Esperanto Asocio, elementa Kurso kun partopreno de 36 gelernantoj, kiu ĝis nun malvolviĝas kun tre granda sukceso. La gvidanto de la kurso estas nia entuziasma s-ano Santiago Mulas Gallego.

---

# NI KOMENTU POEZION

---

«MALVARMA EDZINO», de Eli Urbanova.  
(El la «Esperanta Antologio», de W. Auld).

Nenio lia ŝin ekscitas:  
nek la okul' trankvile blua,  
nek buŝo, ĉiam predikpreta.  
Kondut' entute tro kvieta  
ŝin lasas laca kaj enua.  
Jen kion diri ŝi hezitas.

Malvarma kiel mem marmoro  
glitadas ŝi el vestkiraso...  
Nur kiam ŝi sur lito kuŝas  
kaj suverene li ektuŝas  
dum ama akto sen ekstazo,  
en ŝi eksplodas muta ploro.

«Malvarma edzino» aperas, kune kun aliaj poezioj de Eli Urbanova, en la «Esperanta Antologio» de William Auld, eldonita en 1958. Ĝi konsistas el du strofoj de ses versoj naŭsilabaj, rimantaj ABCCBA.

Malvarmo trakuras la tutan poemon de la komenco ĝis la fino kaj penetras en la animon de la leganto. Urbanova najlas en nia koro la intiman doloron de sia ina protagonisto. Kiamaniere la aŭtorino atingas tion? Ni ekzameni detale la poemon.

En la unua verso ĉiuj akcentoj incidas sur la akutan vokalon «i». Akre kaj konstante tiktakas en la verko du duraj konsonantoj, «k» kaj «t». La unua kaj lasta vortoj de la poemo —nenio, ploro— signife limigas la tekston kaj markas ĝian karakteron.

Verboj en simpla prezenco frostigas la poemon en tempo ne determinita. Nur du verboj kunportas rektan komplementon kaj la aliaj estas netransitivaj aŭ senobjektaj. La senco de movo ekzistanta en ĉiu transitiva verbo ne funkcias en la poemo. **Glitadas** kreas ideon de silenta, senviva falo de protektaj vestoj. Tiel, movo fakte mankas.

Lokaj determinacioj ankaŭ forestas. **Sur lito** indikas konkretan situacion, sed la nudeco de la esprimo utilas nur por reliefigi la malvarmecon de la akto kaj la mankon de ia ajn amo kaj tenereco en ĝi.

Al la demandoj «Kie?» kaj «Kiam?» la poemo ne respondas. Tiel, ĝi restas kvazaŭ intima dramo fermita en ina koro kaj nekonata de la mondo. Plue, nek sono nek koloro animas la universon de la poemo.

Artikolo aperas nur en la okul. Kaj tiu konscia forigo rimarkigas la nedefinitecon de loko, momento kaj personoj, kaj samtempe dramigas la kernon de la poemo: malvarmeco.

Ĉiu verso enhavas kompletan pensunuon. Fakte, oni povus sanĝi la lokon de kelkaj versoj, ne sanĝante la signifon de la parolĉeno.

Nur en la du lastaj versoj aperas adjektivo antaŭ substantivoj. En ambaŭ kazoj, tio akcentigas dramece —**ama akto, muta ploro**—, la valoron de la substantivoj. La ceteraj adjektivoj aperas for de siaj koncernaj substantivoj, tiel paligante la forton de la paro.

Nur du kunmetitaj vortoj aperas: **predikpreta** kaj **vestkiraso**, ambaŭ originalaj kaj esprimovaj. Intensa estas ankaŭ la metafora valoro de Suverene.

Ni ĵus vidis la diversajn rimedojn —fonetikajn, sintaktikajn, stilistikajn— kiujn Urbanova utiligas por krei la glacian etoson de la kompozicio.

En tiu pala, fermita universo, du antagonistoj aperas. Ambaŭ sennomaj, tutsimple edzo kaj edzino. La vira portreto eksplikas (ĉu eksplikas?) la unuan kaŭzon de la dramo: **okul' trankvile blua**, buŝo ĉiam predikpreta. Aliaj indicoj pri li: **suverene li ektusas** (mastrece, sen amo nek kareso). Li estas viro kvieta, rutine plenumanta edzan devon aŭ rajton.

Kaj... la virino? Ame ne motivita, laca kaj enua, hezitanta paroli. Malvarma. Ŝi sentas sin pli perfortita ol amata.

Implicitaj demandoj stariĝas: Kiu kulpas? Ekzistas solvo? La verkistino ne respondas, ĉar ne estas tasko de la poezio solvi problemojn. Ŝi rakontas senpasie, eksponas la premisojn: Edzo senkora, memsufiĉa, kaj edzino malvarma, suferanta. Ĝui la melankolian belecon de la poemo kaj eltiri konkludojn estas laboro de la leganto.

La verko de Eli Urbanova estas, laŭ ni vidis, rakonta poemo surface simpla kaj funde altensia, en kiu latentas forta ŝarĝo de simpatio kaj komprenemo de virino al virino.

J E S

---

## OMAGĜE AL S-ano JOAQUIN LOPEZ HERRERO

La Hispana Esperantista Asocio «Antón Balagué» omaĝe al sia forpasinta membro kaj estrarano, Joaquín López Herrero, decidis meti sur lia tomboŝtono gravuritan metalan lameton kun la jena teksto:

### MEMORE

Al nia neforgesebla amiko  
Joaquín López Herrero  
Hispana Esperantista Asocio  
«Antón Balagué» M. E. M.

La estraro malfermis fonduson por ke ĉiu membro povus kunlabori. Tamen, kaj sciante ke inter la membroj de H. E. F. nia memorinda amiko havis multajn geamikojn, ni invitas ilin preni parton en ĉi tiu fonduso. Se le kolektita mono superus la prezon de la lameno (4.075 p-tojn), nia Asocio transdonus la diferencon al tiu grupo, E-Organizaĵo aŭ esperantisto, kiu iamaniere omaĝos al nia neforgesebla amiko Joaquín López Herrero. Dankon. La monon vi povas sendi al: Hispana E-Asocio «Antón Balagué». Font Nova 32 SABADELL (HISPANUJO).

Luis Serrano Pérez  
Prezidanto

# Recenzoj, Recenzoj, Recenzoj

## **EŬROPA KALENDARO 1981-82.**

Eldonas: Eŭropa Klubo. Paderborn (Germanujo); 54 paĝa.

Prezo 400 p-toj. Mendebla ĉe Libroservo de H.E.F. Dos de Mayo, 4. VALLA-DOLID-4.

Ni havas antaŭ ni surprize kompletan, nekutiman, originalan kaj bele presitan kalendaron.

La kovrilo, diverskolora jam, prezentas la flagojn de la diversaj ŝtatoj apartenantaj aŭ apartenontaj al la Eŭropa Komunumo, kaj per diversaj koloroj kaj frazoj montras kion interne havos la kalendaro, tio estas veran eŭropan kulturen informaron.

La samaj frazoj de ĉiu paĝo aperas en la lingvoj de la membroj de la nuna E-Komunumo, krom en la latina kaj en la internacia lingvo Esperanto. Jam de la unua paĝo, krom la notoj de normala kalendaro (dato, semajntago, monato) kaj ĉiam en la menciitaj lingvoj, paĝon post paĝo, oni trovas veran internacian vortaron por lerni eŭropajn lingvojn aŭ rememori ilin se iam lernitajn.

Krom tio aperas la historio de la evoluo de la Europa Unio, kaj la historio, klimato, ekonomio k.t.p. de la diversaj eŭropaj landoj. Vere ne temas pri poŝa nek mura kalendaro, sed informa kalendaro, taŭga por sciemaj personoj, ĉar ĝi enhavas ankaŭ prezentadon de la fonetiko, gramatiko k.t.p. de Esperanto, krom aliaj tre utilaj informoj pri eŭropaj gastejoj, hoteloj, konendaj Deklaracioj kiel la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj la Memorando de la Eŭropa Klubo.

Por la studentoj, por la lingvamantoj ĉi tiu kalendaro estas posedinda juvelo, kiu permesas lerni aŭ perfektigi en diversaj lingvoj samtempe kaj ekzoni novaĵojn kiuj neniam restos malaktualaj.

Al tio jam dirita, ni devas aldoni ke la kalendaro prezentas en la lastaj folioj la datojn ĝis 1989-a.

Ni gratulas la Eŭropan Klubon de Paderborn pro la granda laboro kaj bona prezentado kaj informado kiun tiu kalendaro proponas al la leganto.

Urueña

## **SKIZO PRI ĈINIO**

Eldonis: «El Popola Ĉinio», Pekino, 1981-a.

Prezo 130 p-toj. Mendebla ĉe Libro-Servo de H.E.F.

Temas pri tipa propagandilo, karakterizata de ĉio kion tio signifas. Kiu legis iujajn el tiuj libroj, tiu jam konas ĉiujn, nur ŝanĝas la lando kaj la nomoj, sed neniam la adjetivoj. Ĉio estas rozkolora, kaj problemoj tute ne ekzistas kaj ĉi-tiu verko ne estas ekcepto, sed male.

La libro komencas per prezento de la ĉiniaj geografio kaj etnografio. Tion sekvas mallonga skizo pri la ĉina historio, uzante la historian materiismon, tre korekte unue, iom manikee poste. La ĉapitro pri politiko kaj socia organizado fariĝas peza kaj unutona, laŭ mia opinio estas eksceso da detaloj.

La du lastaj ĉapitroj, tiuj pri ekonomio kaj kulturo difektas la trouzon de nombroj kaj statistikoj, emfazante la atingojn de la ĉina reĝimo, ĉefe ekde 1948-a, ĉu necesas tiom enuigi ĉiujn? Tamen, aparte interesaj kaj legindaj estas la subĉapitroj traktantaj sciencojn, medicinon, literaturon, sportojn, kaj aliajn aferojn preskaŭ nekonataj pri Ĉinio en Eŭropo.

La plej grava merito de la verko estas sendube ĝia alloga lingvonivelo, kiel estas kutime en ĉiuj eldonaĵoj de «El Popola Ĉinio». Ĝia vortriĉeco estas mirinda kaj ĝia frazkonstruo estas perfekta. Tio, iasence, vualas la aliajn difektojn de la verko.

UNKERA

---

## NEKROLOGO

### Miguel Manteca López (1913-1981)

La verko de Cervantes estas krom eterna, universala. Universala estas Don Quijote de la Mancha, kaj ankaŭ tiaj estas lia ŝildisto Sancho kaj la senkompara Dulcinea del Toboso. Sed, tiu dimensio, kiu konigis ilin tra la tuta mondo pere de tradukoj en nenombrelaj idiomoj, ne plene kontentigis nin. Verko ja universala devas aperi en lingvo universala: Esperanto.

Ne estas do, mirige ke, de kiam la hispanaj esperantistoj informiĝis pri la ekzisto de la kompleta versio de la verko «La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha» en Esperanto, farita de F. de Diego, ĉiuj sentis saman deziron: ke la verko estu eldonita. Unuavice, la tiama estraro de HEJS kaj je sia nomo Miguel Gutiérrez, de Santander, petis de la Patronaro de «Fundación Esperanto» la eldonadon de la verko. Gravaj malfacilaĵoj malhelpis la plenumon de nia deziro. Sed, la mecenateco de gesinjoroj Manteca-Cano, manifestiĝinta per la akiro de la manuskripto kaj ties transdono al «Fundación Esperanto» estis forta impulso por ni, kaj la oferemo de Víctor Ortiz ebligis la eldonadon.

Fine, la 26-an de septembro 1977, okazis en la Ateneo de Zaragoza la oficiala prezentado de la libro!

Per la supraj vortoj komenciĝas la raporto pri la oficiala prezentado de la libro «La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha», en Esperanto.

Kiam la 22-an de septembro ĉijara, ni estis informitaj pri la forpaso de S-ro Manteca, ni preskaŭ ne kapablis kompreni la realon. Sed, kion ni ne povas akcepti, estas la diro: «Nia samideano Miguel Manteca, ne plu inter ni». Por la esperantistoj, precipe por «Fundación Esperanto», li ĉiam vivos pere de la eldono de la universala verko «La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha», en Esperanto, ĉar ĝia eldono, al kiu li tiom kontribuis, signis gravan antaŭenpaŝon en la plisolidiĝo de Esperanto.

Inés Gastón  
Sekr. de Fundación ESPERANTO

Ĝus ni sciiis pri la forpaso de nia samideano JOSEP VENTURA FREIXAS. Pace ripozu.

# DEZIRAS KORESPONDI

Pensiulo, estinta presisto laboranta en paperfabriko, 69-jaraĝa, vidvo, kun hispanoj bankoficistoj aŭ instruistoj. Li konas hispanan lingvon kaj nun li deziras perfektigi Esperanton. Skribu al: S-ro Kestesz Imre, Dunaujvaros; Gagarin Ter 13. V; (2.400 HUNGARUJO).

40-jaraĝa viro, fervojisto, kun gehispanoj por perfektigi la lingvoscion. Li ŝatas vojaĝi kaj fotografii. S-ro Fazekas Miklós.—Népköztársaság u.3. D/5. BALATONFÜRED (H-8230 HUNGARUJO).

16 jaraĝa junulino, kolektanta b.k. kaj ŝatas filmojn kaj teatraĵojn. F-ino Eva Gacsal.—EGER: Mikes k.u. 19 (3.300 HUNGARUJO).

S-ro Duzio Luigi.—Via A. Certosa 13; 14100 ASTI (Italio) interŝanĝante p.m. kaj p.k.

Por kolekti kalendaretojn, Ivan Gjwzeler.—Todorov bl. 11 vh. A.—SOFIO 1408 bul. Petko (BULGARIA).



29-jaraĝa jugoslava esperantisto interŝanĝas uzitajn p.m. S-ro Veliko Kuezeviĉ.—23000 Zrenjanin.—Rade Koncra 26 (Jugoslavio).

Fraŭlo 21-jaraĝa kun hispano pri ĉiu temo. S-ro Rahim Davari.—Ketab Ferushiye nirzakhani.—AZARBAYJAN. Bonab. (Irano).

## ANONCO

### BONA INFORMO

### 20% DA RABATO

La 1982-a abonvarba kampanjo de EL POPOLA ĈINIO jam komenciĝis. Ekde la 1-a de novembro 1981 ĝis la 28-a de februaro 1982 estas ĝia periodo kaj dume farante abonon al la gazeto oni povas profiti 20% da rabato el la abontarifo.

Ne perdu la ŝancon, tuj abonu kaj varbe abonigu viajn parencojn kaj amikojn. Kiel abonvarbanto vi povas ricevi el Ĉinio rekompencadojn. Se vi unufoje sukcesis varbi 4 abonantojn vi do povos ricevi unu pecon de «libro-kupono» kiel donacon, la kupono valoras US\$ 5.00 por peco.

### LA ABONTARIFOJ

(Abonperiodo)	(aktuala prezo)	(rabatiga prezo)
1-jaro (12 numeroj)	600.- Pts.	480.- Pts.
2-jaro (24 numeroj)	1000.- Pts.	800.- Pts.
3-jaroj (36 numeroj)	1500.- Pts.	1200.- Pts.

PERANTO: FELIX GOMEZ MARTIN / c. Corbeta, 8, 5º A / Madrid-22

# 42-a Hispana Esperanto-Kongreso

Málaga 16-a ĝis la 21-a de Julio 1982-a

## **VENDREDON 16-an**

Akcepto de la gekongresanoj kaj disdonado de la dokumentoj

## **SABATON 17-an**

Ekzamenoj

Kunsido de la estraro de H.E.F. kun delegitoj de la Grupoj

Solena Malfermo de la Kongreso. Oficiala foto.

Folkloro andaluzia festo.

Fakaj kunvenoj.

Projekcio de E-filmo.

## **DIMANĈON, 18-an**

Sankta Meso

Prelego en esperanto

Seminario pri «La Instruado de Esperanto en Hispanio, laŭ la popola kaj la registara vidpunktoj».

Organizado de komisionoj kiuj studos la aferojn de la seminario.

Arta Vespero.

## **LUNDON, 19-an**

Vizito al la urbo.

Kunvenoj de komisionoj.

Ĝenerala Kunveno de H.E.F.

## **MARDON, 20-an**

Seminario pri IKUE, HEFA, ILEI, HEJS, k.t.p. en Hispanio.

Hispanlingva prelego.

Solena fermo de la Kongreso.

Bankedo

## **MERKREDON, 21-an**

Tuttaga ekskurso tra la Suna Marbordo.

## **LOKA KONGRESA KOMITATO**

PREZIDANTO	Andrés Martín González
VICPREZIDANTO	Angel Arquillos López
SEKRETARIO	Julio Herrero Segura
VICSEKRETARIO	Ricardo Albert Reyna
KASISTINO	Paqui Corrales Guerrero
VOĈDONANTOJ	Fernando Prieto León
	Jesús García Martínez
	Cristina Tirado Narváez
	Rafael López Castilla
	M. Dolores Gaspar Jiménez